

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penco.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 78 (Seventh Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 decembro 1926

OURSELVES.

The first number of "La Suda Kruco" was issued in July 1920. It was the direct outcome of a resolution of the Sydney Congress of that year, which appointed a committee to issue the journal and set apart the surplus funds of the Congress for the purpose. Ten years previously the first Australian Esperanto Congress, held in Adelaide, regretted that at that time the issue of an Australian Esperanto paper was impracticable, but looked forward to the future. The second Congress, held in Melbourne, was heralded by "La Informilo," a sheet that was distributed gratis; but, as indicated, it was not until 1920 that Australian organised Esperantists considered the time ripe for the regular issue of a paper. Since that first issue "La Suda Kruco" has appeared uninterruptedly. For some reason or other some Esperantists have been uncompromisingly hostile to "La Suda Kruco," and at the Sydney 1923 Congress a motion was tabled that the paper be discontinued. That motion was defeated and a donation from the Congress Funds was made. That was the last official monetary support that "La Suda Kruco" has received; although there was a good opportunity to extend a helping hand to it at the Melbourne Congress at Eastertime last year.

"La Suda Kruco" is undoubtedly appreciated by many Australian and New Zealand Esperantists, who would

be very sorry to see it disappear; but it is regretted that their numbers are not sufficiently large to prevent the publication being other than a matter of great anxiety to the publishing committee upon whom falls the whole of the work and responsibility for the publication. The paper is not sent to any one who did not order it, but in some cases it has been sent for a longer period than the original order paid for. It was thought that if dispatch was ceased immediately a subscription expired, offence might be taken, and, moreover, as the paper is issued to some extent for propaganda purposes it was considered desirable to extend quite considerable credit. This policy has not been altogether justified as a number of recipients of the paper have not paid their subscription up to date and those who have been struck off the list have left a debit which if paid would pay publication expenses for a year! The Committee had just been considering the position and has decided to make an appeal to all Australian Esperantists to make their views accord with those of other countries, who are unanimous in the belief that a strong national society and a well supported national paper are necessary if Esperanto is to make any headway. The letter printed herewith, sent to us by Miss B. K. Blyth, is very timely and we commend the proposal it makes to the sympathetic consideration of all Australasian and New Zealand Esperan-

those two large clubs who could—if they would—extend the subscription list to an extent that would make the publicaion of “La Suda Krucio” a matter of less anxiety than it is at present.

Estimata administranto

Mi havas ideon. Mi deziras pli grandigi la enspezojn de la Suda Krucio, nia sola Esperanta Gazeto. kaj unu kiu povas kompari favore kun eksterlandaj eldonaĵoj . . . laŭtekste, laŭverke, laŭteze, kaj laŭ organize; tial mi proponas, ke ni invitu ĉiujn niajn abonantojn montri ilian ŝaton je nia gazeto kaj prezentu al ĝi je la datreveno de nia Majstro (la 15 decembro) donacon, tiom kiom ili volas . . . grandan aŭ malgrandan.

Mi opinias, ke unuj el niaj samideanoj volante akceptos la inviton, pri kiu ili nur atendas, ĝoje plenumi. Mi enmetas dek ŝilingojn por la superdirita afero.—B. K. Blyth, Surrey Hills.

INTERNATIONAL CONGRESSES AND ESPERANTO.

The 6th International Democratic Peace Congress at Bierville (15-23 August 1926) unanimously adopted a resolution in favour of the international auxiliary language.

A strong group of active Esperantists was present, who furnished a practical demonstration of the advantages of Esperanto for the purposes of international congresses.

A similar demonstration was furnished at the Congress of the Union for Reconciliation at Oberammergau from 13 to 30 August. Among the numerous attendance conversations were frequently heard between several participants from Hungary, Bulgaria and Jugoslavia, who, having no knowledge of any of the official languages of the Congress, employed Esperanto for the purpose of making themselves understood by persons speaking other languages than their own.—I.E.S.

Switzerland.

For the purpose of making the Swiss Alpine Postal Service better known, the General Directorate of Posts in Berne has published a charming series of views of Swiss mountains and Alpine roads with explanatory text in several languages, including, in each case, Esperanto.—I.E.S.

LETERO AL AMIKO EN EUROPO.

Estimata samideano,

Pro tio, ke ŝarkoj ofte venas al niaj marbordoj, kiuj kapablas mortigi homojn, oni starigis ĉe la plej oftaj vizitataj marbordoj, altajn ferajn turojn, sur kiuj dum la tuta tago staras gardstaranto preta averti la sinbanantoj per sonorilo, tuj kiam proksimiĝas ŝarko.

Tiuj, kiuj sinbanis en la ondŝaŭmo ĉe Steyne (banloko proksime al Sydney) perdis tre malmulte da tempo lasante la marplaŭdejon, dimanĉo, 10 oktobro, kiam oni sonorigis la avert-sonorilon.

La alarmo ne estis kaŭzita de ŝarko, sed pro pristo (Segfiŝo), kiu estas ĉe plidangera ol ŝarko. Nelonge post la dua horo posttagmeze la gardstaranto rimarkis ion, kio similas ŝarkon naĝanta al la sinbanantoj. Tuj li sonorigis la avertsonorilon, kaj vokis helpon por ataki la entrudulon. Boato estis surmarigita kaj unu el la savboatoj staris en la beko armita per harpuno. Granda ekscito montriĝis inter la miloj da ĉeestantoj, sur la marbordo, kiam la boato proksimiĝis al la pristo. Subite la viro en la beko de la boato malsupren ĵetegis la harpunon. Tuj la ĉirkaŭa akvo kirlegiĝis en ŝaŭmon kaj oni vidis, ke la fiŝo estis forte harpunvundita.

Okupis kvaronon da horo por surbordiĝi la baraktegantan aŝon. Ĝi havas 18 futojn kaj 2 colojn da longo, kaj la sego havis 4 futojn 9 colojn, kaj sur la sego troviĝas 54 dentoj. Du malgrandaj fiŝoj sinfiksas al ĝia dorso, kaj la savboatoj nur post penegoj sukcesis fortiri ilin for de ilia protektanto.

La pristo portis cikatron, ŝajne ĝi iam vundiĝis dum marbatalo. Oficisto de la savboata klubo diris, ke laŭ reporto de la reprezentisto de la Aŭstralia Muzeo, al kiu oni donis la fiŝon, ĝi estas la plej granda pristo iani kaptita.

- Sinjoro Francis Birtles, pri kiu mi skribis en antaŭa letero nun faras ankoraŭ alian vojaĝon trans Aŭstralio per aŭtomobilo. Li skribis, ke en Nova Sud-Kimrujo kaj la sudokcidenta parto de Kvinslando, la sezono estas favora kaj la rikoltoj estos bonaj, sed en la meza kaj nordorienta Kvinslando mankis la pluvo, kaj la brutaroj suferis, ĉe la kanguruoj estas tiel malgrasaj, ke ne estas utile mortigi ilin por la viando, kaj pro tio ke ili estas tiel malfortaj la sportemuloj ne

volas surpafi ilin; sed unu el la kanguruoj ne estis malforta, kiel unu el nia kunvojaĝantoj trovis, kiam li penis kapti ĝin. Plenaĝa vir kanguruo eniris brutkorton, serĉante akvon kaj ne povis trovi la vojeton por eliri.

Nia kunvojaĝanto postkuris ĝin ĝis la kanguruo sin trovis en angulon. Kiam la kanguruo ne povis eviti la viron, li staris preta por sin defendi. La viro penis kapti la kanguruo per la vosto kaj faligi ĝin; tiam la kanguruo altigis sin ĝis li staris pli ol dek futojn alta, kaj penis kapti la kapon de la viro en siajn antaŭajn membrojn. La viro lerte evitis tion, sed li ne estis sufiĉe rapidmova por eviti la piedbaton de unu el la fortegaj kruroj de la kanguruo. Li estis senkonscia surteren batita, sed dume alia viro ŝteliris malantaŭ la kanguruon kaptis ĝin per la vosto, teren ĵetis kaj kaptis ĝin. Post kiam oni ĉonis trinki al la kanguruo, oni lasis lin forkuri.

Je la unua de junio 1837; kolektiĝis homamaso ĉe la vendejo por ĉeesti la unuan tervendon ĉe Melbourne: tie troviĝis komercistoj, butikistoj, aktualaj koloniistoj el la bone establita urbo de Sydney, kaj oficioj de la milita, marmilita soldataro, elstaraj pro siaj elegantaj uniformoj. Kelkdekoj da indiĝenoj surrigardis el distanco de malproksime.

Strato Collins estas kotega, eĉ tie ĉi sur la monteto kie ĝi kruciĝas kun strato Market; strato Elizabeth estas sub akvo, kaj rivereto fluas laŭ ĝia mezo. Kvankam la vetero estas bela, oni ne povas vidi straton Swanston pro la arboj.

—Tiu ĉi tago estos historia en la venontaj jaroj— diris alta viro al sia kunulo. En la estonteco tie ĉi troviĝos urbo, eble granda urbo. Eble ne dum nia vivtempo, sed ĝi certe efktivigos. Ni enlanden iros, ni pri-laboros la teron eble ĝis la rivero Murray. Progresema lando ĝi certe estos, Tomaso.

—Eble ĝi fariĝos malgranda urbo post kelkaj generacioj— malvole konsentis Tomaso. —Miaparte mi bedaŭras ke mi hodiaŭ aĉetis tiun parcelon. Jen vidu kie ĝi sidas ĉe la angulo de stratoj Swanston kaj Bourke, kaj ne troviĝas domo en la ĉirkaŭaĵo eĉ de kvarono da mejlo. Ĝi plivaloriĝos, vi diras, sed kiam? ne dum tre longa tempo. Post du jaroj

se la sorto favoros min, Tomaso Bennett jam hejmen iros por neniam reveni, por kio do utilos al mi tiu parcelo?

—Mi aĉetos ĝin, vi pagis por ĝi 28 funtojn sterlingajn, —28 funtojn por unu sesono da akreo, kaj vi opinias, ke vi tro multe pagis. Nu, mi aĉetos ĝin de vi por 38 funtoj sterlingaj. —Akceptite—, diris Tomaso.

Kvindek jarojn poste. Civitano malelegante vestita promenadas kune kun la edzino proksime al granda konstruaĵo kiu troviĝas ĉe angulo de du stratoj. Li paŭzis, kaj rigardis la konstruaĵon iom penseme, iom melan-kolie. —Mi ofte aŭdis la patron rakonti la historion—li diris al la edzino. —La avo aĉetis tiun parcelon ĉe la unua vendo por 28 funtoj sterlingaj, kaj vendis ĝin samtage por 10 funtoj sterlingaj pli ol li pagis por ĝi. Hodiaŭ tiu parcelo valoras altegan sumon. Se ni posedus unu futon de tiu parcelo, nur unu futon, ni povus pagi ĉiujn niajn ŝuldojn, kaj krome havi iom por plikomfortigi la vivon. Ĝi valoras po 1700 funtoj sterlingaj por futo, kaj la tuta parcelo valoras 280,000 funtojn sterlingaj, kio estas dekmiloble pli ol la avo pagis por ĝi.

Alia parcelo . . . tiu aĉetita de sinjoro Howie por 45 funtoj sterlingaj en la jaro 1838, valoris 493,500 funtojn sterlingajn 50 jarojn poste. La parcelo estas longa je 122 futoj laŭ strato Collins kaj iom pli laŭ strato Swanston, hodiaŭ ĝi valoras eble 1.000,000 funtojn sterlingajn.

Via fidele, P.H.

ESPERANTO AND COMMERCE.

Two technical conferences on the employment of Esperanto in commerce have already proved the interest taken in the language in commercial circles. The international fairs have long employed Esperanto in advertising. The commercial press is also gradually coming to take an interest in the practical application of Esperanto. One of the principal organs of the German export trade, the Überseepost of Berlin, regularly publishes articles in Esperanto. The weekly edition of the Berliner Tageblatt (Rudolf Mosse, Berlin) intended for circulation abroad, had preceded it with a special column in Esperanto.

KRONIKO.

MELBURNO, V. — Okazis dum la pasintaj tri-kvar semajnoj, kelke da instruaj eroj en la programo de la Melburna Esperanto Societo, en kiuj la anoj verve partoprenis. Debato, tradukoj, kaj aliaj eroj, donis bonan okazon por la lertulo kaj komencanto ekzerci sin en la parolo de la lingvo. Alia ekskurso donis pluan okazon por libera parolo, kaj pasis tre ĝuebla posttagmezo kiam la geesperantistoj marŝis de Glen Iris ĝis Burwood, vive babilante survoje. La malgranda festeno sub la ombro de plenfoliaj arboj, kaj iom da tempo por ripozi estis tre agrabla, kaj la geanoj revenis domon post tre plezura ekskurso. Je la vespero de novembro sesa, estis brodkastita de 3LO, tre interesa parolado "La Studado de Esperanto, kaj kiel profiti je ĝi." La parolanto s-ro R. Rawson, bone parolis pri la utileco de Esperanto en ĉiu fako—literaturo, arto, komercado, k.t.p. kaj diris ke ĉiu trovos ke la lingvo helpas lin pri kia ajn afero li estas interesata.

Mr. H. Banham gave an address on Esperanto at the Methodist School, Palmerston Street, Carlton, on 11th November. The lecture aroused a satisfactory amount of interest.

Mr. J. Skurrie, Vice-president, Melbourne Esperanto Society, gave a lecture on Esperanto before the Rationalist Association of Victoria, at Victoria Coffee Palace, on 6th December.

A Sally McGrundy evening of the Melbourne Esperanto Society resulted in £2/5/9 being collected for the Suda Kruco-Fund.

HOBART, TASMANIO — De Nov-Zelando venas tre kuraĝigaj novaĵoj, pri la kongreso. Ĝia tiea entuziasma samideano, sinjoro W. H. King, sciigas ke 18 personoj jam aliĝis la kongreson kaj oni jam kolektis £6-10- por la kaso, kaj aliuloj promesis aniĝi, vere bona progreso, kaj estas espereble ke la Aŭstralianoj sekvos tiun bonan ekzempleron.

AUCKLAND, NOV-ZELANDO. — Dum pasintaj kelkaj monatoj manĝego de Esperanto lerno-libroj estis spertataj en tiu-ĉi loko. Bedaŭrinde, pro tio, la movado ne ricevis la plenan rikolton de la semado farita per radio kaj ĉiusemajnaj lecionoj, kiuj aperas en du gazetoj. Lerno-libroj (Esperanto Teacher, (Helen Fryer)) kaj poŝvortaretoj nun estas ŝateblaj de la Aucklanda Esperantista So-

cieto. (Fraŭlino J. Dewing, Sekretarino, 5 Aldred Rd., Remuera). Sen-interrompe ni esperu progresi estontece!

DUNEDIN, N.Z. — Bonan laboron por nia lingvo faras Fraŭlino M. McCarthy, kiu ne nur aktive propagandas per la gazetaro sed ankaŭ trafas ĉian okazon por preparoli kaj disdoni detalojn pri Esperanto.

Dum 3a de oktobro publika parolado okazis pri la temo "La Bezonon por Internacia Lingvo." Fraŭlino McCarthy donis al la ĉeestantaro multe da informo rilate Esperanton.

WELLINGTON, N.Z. — Inter la vizitintoj al tiu-ĉi urbo dum la pasinta monato troviĝis la bone konata samideano, Sinjoro M. Hyde, kiu estis rehejmiĝanta al Nova Gineo post vizito al Eŭropo. La delegito kaj vicedelegito de la UEA bonvenigis la ilustrian aŭtoron de la "Esperanto Guide," kiu sciigis pri sia vojaĝado kaj spertoj alilande. La nemultaj lokaj samideanoj tre profitis per la ekzcercado parole kun tia sperta Esperantista kia s-ro. Hyde, kiu ja estas admirinda kaj imitinda parolanto de Esperanto.

Intereso rilate la Hobartan Kongreson pli vigligas; laŭ sciigo al la N.Z. sekretario de la Kongreso, almenaŭ kvin Nov-Zelandanoj konsideras partoprenon. Gisskribdate, donacoj sume pli ol sep funtojn da dudek-ses kongresanoj estas ricevitaj.

Alia (la sepa) lekcio okazis de la sendstacio, 2YK, dum 4a de novembro; la oka sekvos dum 2a de decembro, kiam la temo "Esperanto kaj Komercado" estos traktata de la lekcianto, s-ro W. H. King. La redaktoro de la radia ĵurnalo, "N.Z. Radio," favoras la publikadon de regulaj artikoloj pri Esperanto. Okaze ke lecionoj estos enkondukitaj en la ĵurnalon, kiuj pli poste estos klarigitaj de la sendstacio, Esperanto kurso komencos post la Nova Jaro.

MASTERTON, NOV-ZELANDO. — Nuntempe ni havas grupon; estas la unua fojo ke Masterton reklamis Esperanton. Ni deziras sukceson al la Suda Kruco kaj al la venonta kongreso ĉe Hobart. L. Payne, Sekretario.

ESPERANTO IN ADVERTISING.

The shipping company "French Line" (Compagnie Generale Transatlantique) of London has just circulated an artistic prospectus in Esperanto.—I.E.S.

RECENZEJO.

INSULO DE FELIĈULOJ: August Strindberg El la Sveda originalo tradukis Oskar Frode. Internacia Mondliteraturo, Volumo 17. Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. 69 paĝoj, 1.60 rm.

Ĉi tiu libreto ŝajne estis verkita de Strindberg montri sian malamon kontraŭ la nuna socia sistemo. La rakonto dividiĝis en du partoj: la unua priskribas la senfaradan vivadon sur la vera insulo de la feliĉuloj; la dua rakontas, kiel la vivo, pro la neceso labori, fariĝis pli plenplena. La diversaj anakronismoj — cetero necesaj por la disvolvigo de la romano — ne malpliigas la plezuron de la legado. La priskribo de la kreskado de la socia sistemo sur la dua insulo plaĉas aŭ malplaĉas la leganton laŭ ties politikaj tendencoj. La aŭtoro estis socialisto, kaj malmodereco kaj rikanado karakterizas liajn verkojn. Estas malfacile kredi, ke ne estis eble trovi inter la verkaro de Strindberg pli taŭgan temon por mond'vasta legado.

La Esperanto de la tradukinto estas plaĉa kaj nur la tro postulema kritikanto pri ĝi povus plendi, se estas esceptita la neĝusta uzo de la vorto "idiotismo," anstataŭ la vorto "idioteco," sur paĝoj 58 kaj 63. — (C.W.B.)

GVIDFOLION TRA DRESDEN: ĵus eldonis la Dresdena Esperanto-Societo. Krom bela vidaĵo de la urbo ĝi enhavas ĉian sciindaĵon pri la

ĉefurbo de Saksujo. Laŭdezire oni ĝin sendos senpage al interesuloj, kiuj petas ĉe la oficejo: Dresden-A. I. Struvestr. 40.

ĈIES INTERNACIA ESPERANTA STENOGRAFIO; F. Dyba, Gimnazia profesoro, Berlin-Niederschonhausen. Moltkestr. 4; Unua parto, korespondada skribo, 1 ŝilingon, Dua parto, raportista skribo, 1 ŝilingon.

COMMON COMMERCIAL TERM: IN ENGLISH AND ESPERANTO, Esperanto Institute Limited, Welwyn Garden City, Herts, Eng. Trezo ses pencoj.

Tiuj, kiuj volas uzi Esperanton por komerca korespondado, trovas ĉi tie milon da vortoj kiuj tre helpas al ili turilate.

18th UNIVERSAL ESPERANTO CONGRESS.

The 18th Universal Esperanto Congress, which was held in Edinburgh at the beginning of August, marks a further success for the Esperanto movement.

It was attended by 1,000 persons from 36 different countries (speaking 27 languages) in Europe, Asia, Africa and America. Esperanto was the only language used in all its proceedings. As in previous congresses, there were various special meetings of postal employers, pacifists, doctors, the Esperanto Scientific Associations, vegetarians, anti-smokers, etc.—I.E.S.

SIXTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS

Hobart—Easter 1927.

Esperantistoj ĉie sendu viajn kongresan kotizon al via loko sekretario. La kongreso havos novan mienon . . . Veran piknikon en rava ĉirkaŭaĵo.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prez facile por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per posto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Eucla, Okcidenta Aŭstralio.

20 novembro 1926.

La Redaktoro,

Kun granda intereso mi legis la "Leteron al amiko en Eŭropo" de P.H. Pri la unua aŭtomobilo vojaĝo trans Aŭstralio de Francis Birtles. La kondiĉoj multe ŝanĝiĝis de tiam. Tre bona difinita vojo ekzistas inter la okcidento kaj la oriento. Preskaŭ ĉiu semajne transaŭstralia aŭtomobilisto traveturas, ni eĉ vidis aeroplan-ojn flugante orienten.

La nombro de viroj ankoraŭ estas 6 kaj hundo 1. Sed la kaprinoj treege multobliĝis ilia nombro estas ĉirkaŭ 150.

Due el la oficistoj posedas aŭtomobilojn. Ok monata poŝtŝervo ekzistas al la Transaŭstralia Fervojo. kaj kvar poŝtoj pere de provizŝipo el Fremantle.

Kiam ne estas ventego kaj polvo—nuboj ne puŝados kontraŭ nin, aŭ kiam ne estas tiel nomata ondo de varmeĝo, la klimato estas unu el la plej bonaj en la tuta mondo. Tiam vivo estas tute kontente vivebla tie ĉi.

La Registaro de la Federacio de Aŭstralio jam komencis konstrui novajn telegrafajn liniojn laŭ la Transaŭstralia Fervojo. Estas atendite ke post 6 monatoj la novaj linioj estos konstruitaj kaj nova telegrafa ripeta stacio konstruita ĉe Cook, tiam Eucla ĉesos esti la ripeta stacio. La unika vilaĝo estos forlasata de blankuloj . . .

Eble post kelke da jaroj, la vojaĝantoj trovos ruinaĵojn kovratajn de la rapide alproksimiĝanta sablo de la marbordo.

Via sincere, A. S.

ESPERANTO GOING SOUTH.

Mr. Max Whitelaw is an energetic young Tasmanian. He has just started for the Antarctic with a Norwegian whaling fleet for the third time. He is taking some Esperanto books and hopes to learn the language during the voyage.

As there are several well educated young fellows shipped with him he expects to form quite a class. He also may find some learners among the Norwegians, of whom he speaks highly. He already has a working knowledge of Norse.—N. Simmons, D.B.E.A.

LA FREMDLINGVA BALASTO EN

LA MEZLERNEJOJ KAJ

ESPERANTO.

Ĉar unu el niaj plej gravaj celoj estas la enkonduko de la deviga instruado de Esperanto en la lernejoj, mi pro tio opinias, ke ni fine devas pli intense labori al tiu celo ol ĝis nun. Ni miaopinie pli frue atingos tiun enkondukon en la mezlernejoj ol en la elementaj lernejoj, ĉar jam nun fremdaj lingvoj estas instruataj en la mezlernejoj ĉiulandaj. En elementaj lernejoj oni instruas fremdajn lingvojn nur en landoj (plej ofte malgrandaj) kun kelkaj nacioj. La granda plimulto de tiuj lernejoj sur la tero uzas nur unu lingvon, la enlandan nacian. Pro tio ni celu unue al la pli proksima, kaj speciale el la vidpunkto ne nova, skizita per la sekvantaj rimarkoj. (Mi priskribos la situacion en Ĉeĥoslovakio.)

Tie ĉi la mezlerneja instruplano postulas meznombro 8 ĝis 12 horojn semajne por fremdlingvoj, nome la latina, greka, franca aŭ angla. Tamen 90% de la mezlernejoj ne bezonas ilin en siaj postaj profesioj. La anglan kaj francan lingvojn eĉ ne 5% de la abiturientoj ellernis tiom, ke ili povus korekte uzi ilin en interrilatoj kun la korespondaj nacioj, nek huŝe nek skribe. (Ĉiu mem povos konvinkiĝi pri tio, se li invitos iun abiturienton, ke li korekte traduku iun simplan literaturon en la lingvon, kiun li lernis 7 ĝis 8 jarojn.) La greka lingvo havas por la mezlernejoj la saman valoron kiel la hebrea aŭ sanskrita.

Kiom bezonas la pastroj, juristoj, medicinistoj, natursciencistoj ktp. el la latino? Efektive nur eretojn, kiujn ili povus lerni dum du jaroj, ĉar ili estas jam aŭ tute malmodernaj, aŭ tradukitaj.

Kia tempomalsparo!

Se ni kalkulas 10 horojn semajne por tiuj fremdlingvoj, jen sumiĝas: por monato 40 horojn, por 10 lernmonatoj 400 h., por 8 lernjaroj 3200 h., kaj ĉar ĉiu instruohoro minimume postulas unu horon da prepara hejmlaboro, do pliajn 3200 h., tutsume 6400 horojn . . . sekve preskaŭ ĉiu abituriento estis devigata malspari proksimume 5000 ĝis 6000 horojn, dum sia mezlerneja tempo, kaj dediĉi ilin al por li ne nur senutila sed eĉ mal-

utila laboro, ĉar li per tiom da peno, kaj nervostreĉado, vane konsumis, misuzis sian cerbon kaj malzorgis sian tiel necesan korpan edukon.

Oni scias kaj plendas ĉiam, ke la mezlernejoj estas troŝarĝitaj per lernmaterialo, kadukiĝas spirite kaj korpe sub la tropezo de la lernpostuloj; oni scias, ke la reformo de la mezlerneja instru plano estas tre recesa, sed la aŭtoritatuloj ne volas, kaj la gepatroj ne kuraĝas postuli aliĝon.

Pro tio estas necese, ke ni esperantistoj grandstile atentigu, kuraĝigu, organizu tiurilate la gepataron: Oni postulu, ke fremdajn lingvojn lernu nur tiu, kiu havas talenton por ili kaj kiu ilin bezonos. Sed ĉiu lernu unue la facillerneblan Esperanton, ĉar ĝin povas lerni ĉiu tiel bone dum dekfoje pli mallonga tempo ol iun fremdan nacilingvon, ke li efektive povos paroli kaj korespondi kun ĉiuj alinaciaj esperantistoj. Aliparte, kaj tio estas tre grava, la ellerno de Esperanto estas tre bona preparo por la lernado de fremdaj lingvoj, kiujn oni ja laŭ bezono kaj talento lernos ĉiam!

Tial ĉiu postulu, ke la naciaj fremdaj lingvoj estu instruataj nur nedevige.

Kelkaj homoj asertas, ke per la instruado de la latina kaj greka lingvoj estas akriĝata la spirito. Nu, tiu aserto estas nur malsaĝa frazo, ĉar mallogikaĵoj, kiaj estas tiuj lingvoj kun siaj centoj da kontraŭregulaĵoj neniam povas vere akriĝi la spiriton. Por tio estas pli taŭga la logika matematiko, pli taŭga ol mortaj lingvoj.

La tempon, kiun oni ŝparos per la eligo de la fremdaj nacilingvoj, la mezlernejoj povos uzi duone por instruado de multaj por la vivo pli necesaj scioj (financaj, bankaj, socialekonomiaj ktp.), kaj duone por la korpa plifortigo de la gejunularo.

Jen mi opinias, ke estas necesege, ke ni esperantistoj en ĉiuj landoj tuj publikigu nacilingve en kiel eble plej multaj naciaj kaj fakaj gazetoj tiurilatajn artikolojn kaj organizu amasan kolekton de subskriboj en subskriblistoj, speciale de estantaj kaj estontaj gepatroj de mezlernejoj, sed ankaŭ de aliaj homoj, por ke oni povu ensendi tiujn subskribojn kun rilatan-taj petskriboj por reformo al la landaj ministerioj de la instruaj aferoj.

Mi bone scias, ke multaj reakciuloj kaj malprogresuloj kontraŭas al tiuj

niaj penoj, sed ni ne timu ilin, ĉar ni batalos por bono de la popolo, kaj estos tre grave, speciale pri tiu nia bona intenco konvinki la popolon, por ke ĝi pli volonte konsentu al niaj proponoj.

Hodiaŭ ĉiu atentis pri tio, ke li ne investu en entreprenon tro multe da kapitalo aŭ laboro, nur nia publika instruado ne.

Cetere, la progreso de la nuntempa kulturo estas kaj estos precipe en la natursciencoj. Per fremdlingvoj neniu povos inventi ion.

Ludoviko Krysta, en Ĉech. Teschen 2, Silezio, Ĉeĥoslovakio.

—el Heroldo de Esperanto.

THE TECHNICAL PRESS AND ESPERANTO.

It will be remembered that the International Congress of the Technical Press, which met last year in Paris, adopted a resolution recommending the technical press to publish summaries of articles in Esperanto. A number of journals have already acted on this decision. To the list, which grows in length from day to day, may now be added: "El Magistro Espanol" of Madrid, a review for schoolmasters, the medical organ "Revista de Diagnosticosy Tratamiento Fisicos" of Barcelona, "El Magazino de la Raza" of Havanna (Cuba), a very striking magazino; the "Jolytechnisch Weekblad" of the Dutch engineers, published in Amsterdam. The last-named organ has merely followed the example of the Association of German Engineers in Berlin (VDI), which has introduced an Esperanto column in the various editions of its important technical organ (Engineering Progress, El Progreso de la Ingenieria, etc.).—I.E.S.

WHAT THE B.E.A. THINKS.

"We believe that while Federations, Groups, and individuals, do a great work in recruiting the rank and file of the Movement, it is a numerically strong National Association alone which can effectually work for the Movement in Government and other official circles."

Should not the Australian Esperantists think the same, and work to increase the strength of our Australasian Esperanto Association.

ESPERANTISTINO GAJNIS

HONORON.

Mrs. Bessie Low King, of Gisborne has been awarded the commemoration medal of the International Society of Philology, Sciences, and Fine Arts, an organisation with headquarters in London.—Poverty Times, Gisborne, 14/10/26.

WIRELESS IN THE FAR-EAST & ESPERANTO.

The interest of the oversea stations in Esperanto, especially those of the Far-East, is continually increasing. The Tokio Station has already broadcast several items in Esperanto. The Shanghai (Chine) Station, on 15th May last, broadcast a speech on Esperanto, which has already numerous adherents in that country.—I.E.S.

Russia.

During the 6th International Congress of Esperantist Workers in Leningrad (6-9 August) the Soviet Post Office issued two new artistic stamps with inscriptions in Russian and Esperanto.

Telegraph forms with text in Esperanto for the use of foreigners were employed on the same occasion.—I.E.S.

TEXTBOOK SCARCITY.

Supplies Now Available.

A large Consignment of Fryer's "ESPERANTO TEACHER" just landed. Thirteenth Revised Edition.

Used at 2KY Wireless Station, Sydney.

Societies, Clubs Groups or Individuals can obtain immediate supplies in any quantity from

SYDNEY ESPERANTO SOCIETY

Box 2710C., G.P.O. SYDNEY.

Cut-rate Prices. Prompt Delivery.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, 6; Arbeiter Esperantisten, 6-9; British Esperantist, 259; Bulgara Esperantisto, 1; Belga Esperantisto, 8-9; Bulteno Antverpena, 9; Bulteno de la Internacia Scienca Asocio, 4; Der Arbeiter, 10; Die Einkeitsfront, 36, 37; Espero Katolika, 23; Heroldo de Esperanto, 46 ĝis 54; Informservo de la Internacia Labora Oficejo, oct.; Internacia Esperanto-Servo, 7-8, 9; International Language, oct.; La Suno Hispana, 111, 112; La Fervojisto, 1-2, 3; La Lernanto, 41; Le Monde Esperantiste, 4, 5; Libera Laboristo, 4; La Revuo Orienta, 9, 11; La Progreso, 7; Novaj Tempoj, 10; Oomoto, 20; Oomoto Internacia, 10; Pacifika Espero, 16; Revista del Ateneo, 26, 27; Svenska Esperanto, 9; Verda Stelo, 1.

Melburna Esperanto-Societo, Presidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunveno: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaudon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobart Esperanta Grupo. Kunveno: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Persista Grupo, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunveno kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, 323-325 Bourke Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.